




# Boletín

n° 442 Aprilo - Junio 2023



Asociación de utilidad pública

FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
aperanta de 1949  
Numero 442

Redakto-skipto  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.  
Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es  
angelarquillos@gmail.com

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
respektivaj aŭtoroj

\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn  
\*Republikado de enhavo nur permesita kun per-  
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro  
Financaj aferoj: financoj@esperanto.es  
Aliaj aferoj (escepte de financaj):  
admin@esperanto.es

## Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7  
ES-28015 Madrid  
admin@esperanto.es  
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961  
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926  
4025  
Poŝtelefono: +34 638 547 104  
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo)

### Estraro

**Prezidanto:** Ángel Arquillos López  
**Vicprezidanto:** Alberto Granados Orcero  
**Sekretario:** Manuel Parra  
**Vicsekretario** Isidoro Ortega López  
**Kasisto.** Jesús M. García Iturrioz  
**Voĉdonantoj:** Vicente Manzano (Viko)  
“ Ana Manero

**Prezidanto HEJS**  
**kaj voĉdonanto:** Guaroa Emmanuel González.

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

# SALUTVORTOJ

Karaj gelegantoj de Boletín.

Someras, kaj varmego lacigas la korpon kaj la menson, sed ni laboras sindoneme por okazigi plurajn eventojn, kaj partopreni kaj kunvivadi internaciajn renkontiĝojn tra la tuta mondo en bona etoso, ĉar nia celo estas disvastigi la internacian lingvon.

Danke al pluraj kontribuantoj per gravaj artikoloj, la bulteno estas pli altira kaj amuza. Mi dankegas vian kontribuon kaj de nun mi atendas novajn tekstojn por la venonta numero, kvankam mi volas emfazi la artikolon de Dennis Keefe, kiu partoprenos la kongreson kaj estus bone ke vi legu atente la paĝojn 15-19, ĉar valoras la penon.

En la paĝo 8-a vi povas legi pri la preparoj de la Hispana Kongreso okazonta en la urbo Sevilo al kiu jam estas aliĝintaj pli ol 100 homoj el pluraj landoj. La LKK sindoneme laboras por okazigi brilant eventon en la urbocentro.

Mi lasas vin foliumi la bultenon kaj elekti laŭ via bontrovo, la plej interese aŭ la tuton, kial ne?

Ĝuu la legadon.

Ángel Arquillos  
Redaktoro

# ENHAVO

|  |    |
|--|----|
| Salutvortoj  | 1  |
| Protokolo Ekterordinara Ĝenerala Kunsido               | 3  |
| La Nacia Festo de esperantistoj                        | 5  |
| Pri Grupoj kaj Asocioj                                 | 7  |
| Demarŝoj pri la organizado de la Hispana Kongreso      | 8  |
| Libro de Delibes tradukita al Esperanto                | 9  |
| Someraj internaciaj kongresoj                          | 9  |
| Esperanto en la Tago de la Libro                       | 10 |
| Miguel Fernández prelegas pri Lorca                    | 10 |
| Ekspozicio pri Esperanto en Aspe                       | 11 |
| Esperanto uzata en grava kunveno                       | 12 |
| Premio Cervantes 2023                                  | 14 |
| Esperanto-plaĝo Cullera                                | 15 |
| La persona arkivo de Vicente Inglada en la BNE         | 20 |
| Fervoja Angulo   | 23 |
| La Stranga Angulo, ĉapitro 9                           | 25 |
| De A al Z  | 28 |
| Ĉu la prezidanto Putin sidiĝos antaŭ la krima kortumo? | 29 |
| Kampanio por konservo de la kursoj de Duolingo         | 30 |
| Esperanto en la Fakultato pri Filologio                | 31 |



# PROKOKOLO

## Eksterordinara Ĝenerala Kunveno 21majo 2023

(**NOTO:** La Ordinara Ĝenerala Kunveno okazos oktobre, kadre de la kongreso en Se-vilo.)

La 21-an de majo 2023 je la 11:00 horo, laŭ kunvoko de la Prezidanto, okazas Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio per interreto, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (1a de majo 2022)
- 2.- Elektro de nova voĉdonanto pri la junulara sekcio
- 3.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2022
- 4.- Aprobo de la raporto pri aktivajoj de 2022
- 5.- Informo pri la anaro
- 6.- Aprobo de la Buĝeto por 2023.
- 7.- Projektoj por 2023
- 8.- Sugestoj kaj demandoj

### Ĉeestantoj:

Ĉeestas la kunvenon 5 membroj de la estraro kaj pliaj 6 membroj de HEF. Entute, 13 individuaj membroj, 2 el ili reprezentataj de la sekretario, kaj ankaŭ estas reprezentataj la Grupoj: Kantabra, Madrida (Liceo), Andaluza, Ekstremadura, Liberano (Teruelo) kaj Bilbao.

1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (1a de majo 2022)  
Ĝi estis publikigita en Boletín numero 438. Oni aprobas ĝin unuanime.

2.- Elektro de nova estrarano, voĉdonanto pri la junulara sekcio, pro demisio de William Guerrero.

En septembro de 2022 ŝanĝiĝis la prezidanto de la junulara sekcio HEJS, pro demisio de William. Sekvante la tradicion, la estraro de HEF nomumis estrarano de HEF la novan prezidanton de HEJS, S-ron Emmanuel González, kiu membriĝis en HEF/HEJS en junio de 2021. Tiu ĉi nomumo estis provizora ĉar devos (mal)konfirmi ĝin la Ĝenerala Kunveno.

Oni elektas S-ron Emmanuel González estrarano de HEF en la posteno voĉdonanto.

La sekretario komunikos la ŝanĝon al la ministrejo pri internaj aferoj.

3.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2022

Ĝi estis publikigita en Boletín numero 441, paĝoj 8a ĝis 13a. La kasisto klarigas kelkajn punktojn. Oni aprobas ĝin unuanime.

4.- Aprobo de la raporto pri aktivajoj de 2022

Ĝi estis publikigita en Boletín numero 441, paĝoj 4a kaj sekvaj. Neniu deziras fari komentojn, kaj oni aprobas la raporton unuanime.

## 5.- Informo pri la anaro

Datumoj je 21/05/2023

Individuaj membroj (OM, DM, PM kaj HM): 193

Kolektivaj membroj (KM): 13

Entute (individuaj + kolektivaj): 206

Novaj aliĝoj ekde 01/01/2022 : 6

Malaliĝoj dum 2022 : 5

## 6.- Aprobo de la buĝeto por 2023

La buĝeto estis publikigita en Boletín numero 441, paĝo 9a. Oni aprobas ĝin unuanime.

## 7.- Projektoj por 2023

HEF partoprenas la projekton de TEJO “Tridek oraj horoj”, kiu intencas eniri la EU-programon Erasmus+. Carlos Pesquera, reprezentanto de TEJO, skizas la trajtojn de la projekto, kiu jam ampleksas 300 lernejanojn en ses landoj. Se la projekto ne ricevos ĉi-jare la finan aprobon, oni reprovos en la sekva alvoko.

HEF faros bitan eldonon de la verko de Antonio Marco Botella *Analoj de la esperanta movado en Hispanujo*, por disponigi ĝin libere per Bitoteko.

Ni denove kontaktos kun la grupo de Guardamar del Segura, pri traduko de libro de Ricardo Codorníu okaze de la centjariĝo de lia forpaso.

Endas ŝanĝi la retejon de la sistemo Jomla al la sistemo Wordpress kaj, profitante la okazon, indas aktualigi la enhavojn ĉar en multaj aspektoj ĝi estas malnova. Oni kreis teamon por tiu tasko kaj la laboroj komenciĝis, sed provizore haltiĝis pro laboraj devoj de la kunordiganto de la teamo.

## 8.- Sugestoj kaj demandoj

Ŝajnas, ke la retadreso <bulteno(ĉe)esperanto(punkto)es> ne estas prizorgata. Oni kontrolos tion kaj redirektigos ĝin al la adreso de la redaktoro de Boletín.

Pri la Hispana Kongreso, okazonta oktobre en Sevilo, oni informas ke post kelkaj tagoj aperos la provizora programo. Jam oni interkonsentis kun ses aŭ sep prelegantoj. Ankaŭ okazos antaŭkongreso en la Universitato de Sevilo.

Por la Hispana Kongreso de 2024, la estraro kontaktos kun kelkaj lokaj grupoj.

La kunveno finiĝas je la 12:53 horo.

Manuel Parra, sekretario

# LA NACIA FESTO DE ESPERANTISTOJ: LA 26-A DE JULIO ĈIUJARE

Ĉiu lando havas sian nacian feston. Kutime temas pri la dato en kiu okazis grava evento por la nacia komunumo: akcepto de la baza leĝo/konstitucio, venko en milito, fino de milito [kiun oni malvenkis], naskiĝo de la reĝo, forigo de la reĝo kaj starigo de respubliko, ktp.

Oni ankoraŭ debatas, ĉu esperantistoj estas popolo, komunumo, grupo aŭ io alia, sed certe ili estas socia grupo kun malklaraj limoj, kiu iras de ĵusaj komencantoj al veteranoj kaj ankaŭ ili havas siajn festojn. Lastatempe apud la pli konata, almenaŭ en Eŭropo, la Zamenhof-tago de la 15-a de decembro, komencas aperi nova kvazaŭnacia festo, la 26-a de julio.



Se mi estas verkanta ĉi tiujn liniojn kaj vi estas leganta ilin, tio ŝuldiĝas al la 26-a de julio. Sen ĝi ni ne estus parto de la Esperanto-movado/komunumo/civito/grupo/klubo/asocio [elektu laŭplaĉe]. Kio okazis la 26-an de julio 1887? Io relative banala kaj apenaŭ atentata de la tiam mondo. Aperis en Varsovio libreto kun la titolo en la rusa lingvo: „Международный языкъ. Предисловіе и полный учебник“, alivorte: Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro. Do, la tiel nomata "unua libro de Esperanto", kiu poste aperis en aliaj lingvoj. Por havi ideon pri tio, kion la mondo atentis anstataŭ atenti libreton aperintan en Varsovio: en Britujo en tiuj tagoj oni estis festanta la oran jubileon pro 50 jaroj da regado de la reĝino Viktoria kaj ĝuste antaŭ kelkaj tagoj Zulu-lando estis iĝinta parto de la brita imperio.

Sed tiu libreto havis efikon, kiu postvivis la finon de la brita imperio kaj naskis serion da eventoj, kiuj kreis mondvastan komunumon de Ĉinujo al Londono kaj de Aŭstralio al la Baltaj landoj por ne paroli pri Mongolujo kaj Ameriko.

Do, tiu mondvasta komunumo rajtas festi la daton de sia apero, la 26-an de julio, kaj post jaroj da provoj nun fine Universala Esperanto-Asocio decidis voki la esperantistojn por festi ĝin laŭ du planoj. Unuflanke esperantistoj simple konduku kiel kondukas ĉiuj aliaj homoj, kiuj festas similajn festojn. Ili festu per kunvenoj, ceremonioj, festaj manĝoj, ekskursoj, donacoj, bondezirado, gazetaraj konferencoj, kaj ĉiu alia agado konvena laŭ la lando kaj la lokaj sociaj moroj.

Oni ankaŭ profitu la okazon por informi necesperantistojn pri nia ekzisto kaj pri la kialoj de nia ekzisto. Kaj en mondo ĉiam pli militema kaj ĉiuokaze firme intencita detrui sin mem pro troa ekspluatado de la planedo, la afiŝo pretigita de la oficejo de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj ŝajnas al mi tre taŭga por priskribi nin kaj nian ekzisto-raĵon: *[afiŝo sendita aparte]*

La dua plano de la festado estas internacia kunordigita agado por atingi la deklaron de la Monda Tago de Esperanto [26-a de julio] fare de Unesko, kio estas tre malfacila, ĉar tiajn deklarojn faras la Ĝenerala Asembleo de Unesko, en kiu decidas la reprezentantoj de ĉiuj membro-ŝtatoj. Do, esence almenaŭ unu ŝtato devas proponi tion kaj la aliaj devas voĉdoni por ĝi. Unesko de tempo al tempo deklaris tiajn tagojn, laste pri la afrika lingvo suahila [kiu tamen jam ricevis similan agnoskon de UN] kaj estas lingvo vaste parolata en Afriko.

Ne estas facile antaŭvidi kiom da tempo la tuta monda Esperanto-movado bezonos por trovi la bezonatan subtenon de kelkaj ŝtatoj, sed la provo estos potenca okazo por informi pri Esperanto la naciajn Unesko-komisionojn, la ministeriojn pri eksteraj rilatoj, la ĵurnalistojn kaj do entute meti la movadon pli en la publikan vivon de la landoj.

Sed ni esperas kiel esperantistoj.

Renato Corsetti, Francois Lo Jacomo, Humphrey Tonkin  
Uea: la labor-grupo pri la Esperanto-Tago

# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## Aragono

Pro propono kaj iniciato de samideano, eblis verdigi program(er)on de neesperantista kongreso.

En Zaragozo, ene de kongreso pri informadiko libera ("esLibre") okazis prelego pri Esperanto.

Estis nia samideano Notxor (membro de "Frateco") kiu pretigis kaj faris paroladon la 12an majo 2023 en konstruaĵo "Etopia" (nomo de loko kiu povus ŝajni bela E-loko).

La titolo estis kaj temis pri koincidoj de Esperanto kun libera softvaro kaj poste, li faris atelieron pri Esperanto, montrante la bazajn elementojn.

Ĉeestis esperantistoj ne nur de Frateco sed el aliaj urboj kiel Barcelono aŭ Valencio (unu el ili komentis pri la interesa projekto "[bitarkivo.com](https://bitarkivo.com)" por enretigo de E-revuoj). La salono estis plenplena. La simpatia prelego plaĉis al ĉiuj.

Estas malofta okazaĵo kiam en ekstermovada evento aperas partoprenantoj kiuj salutas kaj parolas en Esperanto.

Jen ligilo al la prelego:

<https://notxor.nueva-actitud.org/esperanto/esLibre>

## CONCORDANCIAS

### LENGUA AUXILIAR VS SOFTWARE LIBRE

- Responden a una **injusticia percibida** .
- **Igualan oportunidades** entre usuarios.
- Incidencia sobre la **libertad** de los usuarios
- **Pertenecen a sus usuarios** .

Lorenzo Noguero

# DEMARŜOJ POR LA ORGANIZADO DE LA VENONTA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO ANTAŬENIRAS

La organizantoj de la venonta hispana kongreso okazonta en Sevilo de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro daŭre renkontiĝas, ankaŭ dum la somero malgraŭ la altaj andaluziaj temperaturoj. La celo de tiu dekhoma skipo estas havigi al kongresanoj neforgeseblan renkontiĝon kaj ankaŭ altiri la atenton de pli da geesperantistoj ĉar la sevila kongreso estos renkontiĝo nepre vizitenda kaj ĝuenda.

Ene de la kultura programo jam estas decidita la prezento de nova libro “125 años de esperanto en Sevilla” (125 jaroj da esperanto en Sevilo), kiu pritraktos la historion de la lingvo kaj la movado en la andaluzia ĉefurbo. Pliaj prelegoj okazos, inter ili tiu de Duncan Chartes pri la ĉeftemo de la kongreso “Esperanto, komprenemo inter popoloj”. Sciu, ke D-ro Chartes estas la prezidanto de UEA kaj li partoprenos en la hispana kongreso. Pliaj prelegoj pri lingvoj, informadiko, astronomio, ktp ankaŭ estas pripensitaj.

La organizantoj ankaŭ planas organizi turisman viziton, ĉu al la Beletra Muzco, ĉu al la romiaj ruinaĵoj de Italiko. Kial ne al ambaŭ lokoj? La Beletra Muzco de Sevilo estas la dua plej grava en Hispanio, post tiu de El Prado en Madrido. Kaj kion diri pri Italiko? La lulilo de la romiaj imperiestroj Trajano kaj Hadriano. Ankaŭ okazos la prezentado de tri teatraj verkoj kun humura tono, originale verkita en nia lingvo kaj kun temoj rilataj al esperanto.

Kaj krom ĉi ĉio partoprenantoj ĝuos la kutiman agrablan etoson de la hispanaj kongresoj.

Do, ne hezitu aliĝi al 81a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo, de la 12a ĝis la 15-a de oktobro. La kongreso okazos en la sidejo de la sindikato UGT, ĉe la avenuo Blas Infante. Do, ni konsilas al partoprenantoj ne prokrastigi la rezervon de hotelo aŭ

loĝejo, se vi bezonas helpon tiurilate ne dubu kontakti kun la organizantoj.



Pliaj informoj kaj aliĝilo troviĝas ĉe la ret-lokoj:

hispanlingve: <https://kongreso.esperanto.es/es>  
esperante: <https://kongreso.esperanto.es/eo>

Kongresa Organiza Komitato de Sevilo

## LIBRO DE DELIBES TRADUKITA AL ESPERANTO

Aperis la traduko al Esperanto de unu el la ĉefaj romanoj de la kastilia verkisto Miguel Delibes. La romano titoliĝas *Sinjinorino en ruĝo sur griza fono* (*Señora de rojo sobre fondo gris*), kaj ĝi estas unu el la plej personaj verkoj de Delibes, kun klaraj membiografiaj referencoj kaj omaĝo al lia edzino, Ángeles, forpasinta nur 51-jaraĝa.

Ĝi estis tradukita de la konata aŭtoro kaj tradukisto Antonio Valén, kaj eldonita de Mondial, kunlabore kun la zaragoza Fondaĵo Esperanto.

Ĝi estas la unua tradukita al Esperanto verko de Miguel Delibes (1920-2010), eble la plej populara verkisto en Kastilio en la mezo de la 20a jarcento.

La libron oni povas akiri en la libroservo de Hispana Esperanto-Federacio, ĉe UEA kaj en aliaj retaj vendejoj.



## SOMERAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ

Jam pli ol mil homoj (inklude de pli ol kvardek venontaj el Hispanio) aliĝis al la Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en Torino (Italio), inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto. Oni atendas ampleksan ĉeestantaron, post la problemoj okazigitaj de la monda pandemio. Oni povas trovi ĉiujn informojn, inklude de la manieroj aliĝi, en la retejoj de la LKK kaj de UEA.

La 79-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Lignano Sabbiadoro, apudmara loko ankaŭ en Italio, inter la 5a kaj la 12a de aŭgusto, tuj post la fino de la UK. Ĝin organizas internacia teamo de spertaj eventorganizantoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ĝi okazos komune kun la 56-a Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

La 96a SAT-kongreso okazos ĉeeste en unu el la kulturdomoj mastrumataj de francaj esperantistoj: la kastelo Greziljono. La kongreso daŭros inter la 18a kaj la 25a de julio 2023.

Krom tiuj, multaj aliaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas programataj tutmonde. Vi povas scii pri multaj el ili pere de la retejo EventaServo.

## ESPERANTO EN LA TAGO DE LA LIBRO

Madrida Esperanto-Liceo estis denove invitita partopreni la Nokton de la Libroj, ĉiujare organizatan de la Madrida regiona registaro, ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Libro, en aprilo. MEL elektis kunmemori la kvindekajn datrevenon de la morto de la ĉilia poeto Pablo Neruda por prezenti ekspozicion de libroj de latinamerikaj verkistoj tradukitaj al Esperanto. La dato estis la 21a de aprilo, kaj la loko, la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio.

Ankaŭ en Madrido, Esperanto denove partoprenis en la sinsekva legado de la verko Don Quijote, organizita de la kulturinstituto Círculo de Bellas Artes. La 20an de aprilo vespere du esperantistoj laŭtlegis kelkajn paragrafojn. Vi povas ilin spekti tie ĉi kaj tie ĉi.

Aliflanke, Kataluna Esperanto-Federacio denove starigis budojn en la Tago de la Libro (tradicie nomata Tago de Sankta Georgo en Katalunio, la 23an de aprilo), en Barcelono kaj Sabadell. En ambaŭ budoj, la asocio disvendis la plej freŝajn eldonaĵojn kaj ankaŭ aliajn elektitajn librojn, krom diversajn aliajn objektojn, kaj profitis la okazon por informi pri Esperanto kaj pri venontaj kursoj.



## MIGUEL FERNÁNDEZ PRELEGAS PRI LORCA

Dum la lastaj semajnoj Miguel Fernández partoprenis en diversaj prezentadoj omaĝe al Federico García Lorca, okaze de la 125a datreveno de ties naskiĝo. En la semajnfino de la 25a kaj 26a de marto oni invitis lin je la prezentado de mallonga filmo "La camisa blanca" (La blanka ĉemizo), reĝisorita de Bego Guerrero, pri la vivo kaj morto de la poeto. La sabaton 25, li partoprenis kunbabiladon en la Ateneo de Madrido. La 26an la loko elektita estis la Fondaĵo Anselmo Lorenzo, de la sindikato CNT

Ankaŭ okaze de la menciata "Nokto de la Libroj", la 21an de aprilo, en la Casa San Cristóbal de Fundación Montemadrid, en la distrikto Villaverde, oni programis renkonton kun Miguel kun la titolo "Ni babilu pri Lorca", kun lernantoj de mezlernejo I.E.S San Cristóbal de los Ángeles, kaj ankaŭ kun ĉesto de ĝenerala publiko. MEL profitis la okazon por donaci plurajn librojn pri Esperanto al la biblioteko de tiu institucio.



Miguel estis prezentita en ĉiuj kazoj kiel esperantista poeto kaj tradukisto de Lorca al la internacia lingvo.

## Alakanto

### EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN ASPE



Inter la 14a kaj 29a de aprilo estis montrira en Aspe (provinco Alikanto, Valencia regiono) la ekspozicio "Esperanto, idioma internacional". La loko estas salono de eksponaĵoj en la loka teatro Wagner, kaj ĝi estas vizitebla inter 19,00 kaj 21,00 horoj.

La inaŭguron partoprenis la urbkonsilisto pri kulturo, turismo kaj festoj, Rosa María Ruiz Martínez, la direktoro pri kulturo, Manuel Benítez Bolorinos, kaj Ángel Miralles Pastor, membro de la asocio de Esperanto de la provinco de Alikanto, kun ĉesto de la lokaj amaskomunikiloj.



# ESPERANTO ESTAS UZATA EN GRAVA KUNVENO DE GVIDANTOJ DE UNUIĜINTAJ NACIOJ



## Universala Esperanto-Asocio

La 12-an de junio 2023, la Komitato de Neregistaraj Organizoj (NROj) pri Lingvoj, tema komitato de la Konferenco de NROj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (konata kiel CoNGO) kaj la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, fakula reto de esploristoj kiuj specialiĝas pri multlingvismo, kune kun la Konstantaj Misioj de Andoro, Burundo, Ekvatora Gvineo, Ĝibutio, Hispanio kaj Kanado, kaj la Konstanta Observa Misio de la Frankofonio (francparolantaj landoj), kunvokis specialan kunvenon kun gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj pri la temo Konstrui reciprokan kompreniĝon pere de multlingvismo.

La kunsido mem estis multlingva, kun simultana interpretado en la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj (la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa). Krome, Universala Esperanto-Asocio kunordigis provizon de interpretado en Esperanto, fare de la teamo Duncan Charters, István Ertl, Edmund Grimley Evans, kaj Adrian Tanner. La Komitato de Neregistaraj Organizoj pri Lingvoj, kies prezidanto kaj vicprezidanto estas respektive la reprezentantoj de UEA al Unuiĝintaj Nacioj prof. Francis Hult kaj prof. Humphrey Tonkin, estis la ĉeforganizanto de la kunveno. Prof. Hult rolis kiel kunordiganto kaj gvidanto.

Inter la parolantoj estis pintaj gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj – plej notinde Lia Ekscelenco s-ro Csaba Kőrösi, prezidanto de la 77-a Ĝenerala Asembleo de UN. Aliaj pintaj gvidantoj kiuj intervenis estis s-ro Movses Abelian, Suba Ĝenerala Sekretario por Ĝeneralasemblea kaj Konferenca Mastrumado kaj Kunordiganto de Multlingvismo; s-ro Miguel de Serpa Soares, Suba Ĝenerala Sekretario pri Juraj Aferoj kaj Ĉefadvokato pri Politiko, kaj s-ino Lisa M. Buitenheim, Asista Ĝenerala Sekretario pri Subtenaj Operacioj.

La kunvenon alparolis pluraj UN-ambasadoroj: Lia Ekscelenco s-ro Zéphyrin Manirantanga, konstanta reprezentanto de la Respubliko de Burundo; L.E. s-ro Anatolio Ndong Mba, konstanta reprezentanto de Ekvatora Gvineo; L.E. s-ro Mohamed Siad Doualeh, konstanta reprezentanto de la Respubliko de Ĝibutio; Ŝia Ekscelenco s-ino Ana Jimenez de la Hoz, vica konstanta reprezentanto de Hispanio; L.E. s-ro Robert Keith Rae, konstanta reprezentanto de Kanado; L.E. s-ro Yuri Ariel Gala López, vica konstanta reprezentanto de Kubo; Ŝ.E. s-ino Ana Paula Zacarias, konstanta reprezentanto de Portugalio; kaj Ŝ.E. s-ino Ifigeneia Kontoleontos, konstanta observanto de la Internacia Organizo de la Frankofonio. Krome parolis s-ino Sofia Margaryan, konsilanto pri humanitaraj aferoj ĉe la Konstanta Misio de la Respubliko de Armenio

Aliaj parolantoj estis i.a. stabanoj de la Ekipo por Multlingva Agado ĉe la oficejo de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo kaj la Multsektora Regiona Oficejo de Unesko en Bangkoko, plus reprezentantoj de civilsociaj organizoj kaj sciencaj fakuloj. Civilsociaj reprezentantoj prof. Humphrey Tonkin de UEA kaj pastro Hans Becklin de TEJO, kiel ankaŭ scienca fakulo prof. Mark Fettes de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj la Universitato Simon Fraser, faris siajn rimarkojn en Esperanto. Aliaj parolantoj uzis la araban, anglan, francan, hispanan kaj rusan.

Prof. Tonkin legis la anglalingvajn rimarkojn de d-ro Liberato Bautista, prezidanto de la Konferenco de NROj, CoNGO.

La kunveno reprezentas la plej fortikan ĝisnunan utiligon de Esperanto en kunveno de gvidantoj kaj koncernatoj de Unuiĝintaj Nacioj. Tiurilate, temas pri sukcesa momento en la strategio de UEA por antaŭenigi la praktikon de multlingvismo en Unuiĝintaj Nacioj kaj malfermi pordon al utiligo de multaj lingvoj, inkluzive Esperanton, por engaĝi pli larĝan tutmondan perspektivon – kio konsistigis la ĉefan temon de la kunveno. Kune, la parolantoj interdiskutis la demandon de fortigo de internacia kunlaboro pere de multlingvismo, faciligo de problemsolvado, kaj profundo de interkompreniĝo trans diferencoj.

Multlingvismo, ebliganto de multflanka diplomatio, estas kerna al la laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi efike plifortigas sekvadon de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj, inkluzive de la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Ĉar ĝi estas antaŭkondiĉo de signifoplena dialogo, multlingvismo estas nepra antaŭkondiĉo por konstrui kompreniĝon kaj solidarecon inter homoj kaj nacioj surbaze de egaleco, kaj por dividi scion kaj identigi komunajn solvojn al la defioj kiujn la mondo alfrontas. Multlingvismo esencas por kunigi la komunumon de nacioj ĉe la decidopunkto, kaj por garantii efikan dudirektan komunikadon ĉe ties realigo. Adekvate fronti lingvan diversecon, interne kaj ekstere, estas ankaŭ antaŭkondiĉo por ke neniu homo postrestu, kaj ke ĉiu homo ricevu egalan pritrakton.

Oni registris la kunvenon, kaj la video estos spektbla perrete.

Rete

# PREMIO CERVANTES 2023

Rafael Cadenas (Barquisimeto, Venezuelo, 1930) ricevis la Premion Cervantes 2023.

Jen lia poemo “*Mi vizitis la milde luman teron*” (Yo visité la tierra de luz blanda) el “*La kajeroj el la ekzilo*” (Los cuadernos del destierro, 1960).

*Mi vizitis la milde luman teron.*

*Mi paŝis inter melonoj kaj maraj herboj, manĝis fruktojn alportitajn de adoleskaj pastriroj, palpis arbojn de brike ruĝa sevo starantajn apud la tombo de princo, vidis malnovajn katafalkojn de regantoj gardatajn de lantmovaj palmoj. En la ĉirkaŭaĵo sidis bovloformaj radikoj kie simioj kvietigis sian soifon.*

*Mi pasigis iun tagon proksime de la loko kie dormas la pendigitoj.*

*Tiamis la tempo en kiu la sorĉistoj estis ekirintaj al la rizkampoj detruinte ĉiujn talismanojn.*

*Sur la buntaj stratoj obskuraj knabinoj dancadis.*

*Tiam la kapitanoj, ignorante siajn okulojn, esploris la urbon.*

*El ĉi vojaĝo trans la supozatajn limojn mi konservas nur kelkajn marstelojn, plurajn portretojn – ŝi kaj mi – kaj migrantan kofron, kiun mi trovis en la ŝipo dum la marvojaĝo.*

*Pri la lingvo kaj pri miaj agoj en tiu dirita lando, nun ĉiu bildo estingiĝis. La velŝipoj frapas al la pordoj de l'aero kie mi persistas. La lumo alportas al mi mortintajn delfenojn. Via odoro reakiras la kapablon tremigi.*

Trd: Liven Dek



## Esperanto-Plaĝo II, Cullera, 1 Aprilo, 31 Majo, 2023 Dennis Keefe, Valencia Esperanto-Grupo

De la unua de aprilo ĝis la tridek-unua de majo okazis en la hispana ferio-urbo Cullera, la dua Esperanto-Plaĝo, kie gelernantoj el Eŭropo kaj Azio kunstudis Esperanton, 8 horojn ĉiutage dum 30 tagoj en aprilo, kaj 4 horojn ĉiutage dum 31 tagoj en majo. En aprilo la kursanoj havis unu liberan tagon ĉiusemajne, kaj en majo du ferio-tagojn. Ili utiligis la ferio-tagojn por ekskursi kaj babili esperante tra la tuta provinco Valencio. Ĉeestis 6 Esperantistoj: 4 gelernantoj, 1 gasto, kaj 1 kursgvidanto El Ĉinio (Ningna), Hispanio (Conchita), Francio (Gilles, Beatrice), Svislando (Max), kaj Usono (Dennis). La plejparto de la lernantoj estis emeritoj, sed ankaŭ junuloj, kiuj povis liberigi du monatojn por la kurso. Ĉiuj havis, ĉi foje, antaŭan sperton kun Esperanto.

Imitinda modelo por intensaj kursoj? La kurso sukcesis. La strukturo, la kurso-enhavo, la metodoj, eĉ la feria loko permesis al ĉiuj — kursgvidanto kaj gelernantoj — intense kaj longe studi kaj utiligi Esperanton. Kaj pro tio, la modelo povas taŭgi por aliaj lokoj kaj aliaj situacioj. Ĉu Esperanto-Kastelo, Esperanto-Montaro, Esperanto sur la Kamparo, Esperanto-Vintro, Esperanto-Afriko, Esperanto-Nepalo? Intensaj, tre intensaj kursoj vere eblas, kaj tion klare montris kaj Esperanto-Plaĝo I kaj II en Hispanio, kaj ĝia gepatra evento, Esperanto-Insulo I, II, III kaj IV en Ĉinio. Por starigi aldonaĵojn, intensajn, lerno-centrojn de Esperanto, la unua demando estas “Kie en la mondo, kaj kiam dum la jaro?” La dua demando estas “Kiel trovi materialojn por tiom da intensaj kursoj?” Kaj kiu gvidos la kurson? Kaj de kie venos la gelernantoj? Nun, ni parolu pri la ĉi-jara Esperanto-Plaĝo:



Atendante niajn kafojn en marborda hotelo. Ni ofte lecionis en apudaj trinkejoj.

## La strukturo de la intensa kurso

En la unua monato: Kiel jam dirite, la tuta kursaro disvolviĝis dum 61 tagoj. La plej longa movada kurso en la mondo nuntempe. En la unua duono de la kurso, do en aprilo, la gelnantoj ĉeestis lecionojn 8 horojn ĉiutage krom ĵaŭde. Tio estas tre intensa! Dum la unua parto de la tago ni lecionis inter la 9:00 matene ĝis la 1:00 posttagmeze. En la dua parto ni havas lecionojn inter la 17:00 kaj la 21:00. Dum tiuj ok horoj estas multe da paŭzoj, kaj ili estas relative longaj. Tio multe helpas elteni la intensan ritmon. Ĉiuhore ni studis kaj praktikis 45 minutojn, kaj ripozis 15. Kutime la gelnantoj reiris al siaj apudaj loĝejoj dum tiuj paŭzoj, aŭ ili restis kaj babilis esperante kun siaj kunlernantoj. La longa tagpaŭzo de kvar horoj donis tempon al ĉiuj prepari tagmanĝojn en siaj propraj apartamentoj, aŭ viziti unu el la multegaj plaĝaj, riveraj kaj urbaj restoracioj. Kaj iri al la supermerkato, kaj ripozi kaj fari ion ajn. Kvar-hora paŭzo sufiĉe longas, kaj tia paŭzo tre similas la sudan hispanian laboro-ritmon.

En la dua monato: En la lastaj 31 tagoj de la kurso, do, en majo, la strukturo radikale ŝanĝiĝas. Ne plu estas lecionoj dum la tuta tago, sed nur dum la mateno, inter la 9:00 kaj la 13:00. La enhavo de la lecionoj ankaŭ ŝanĝiĝas, kaj pri tio ni parolos sube. Krome, ne plu estis ses tagoj da lecionoj ĉiusemajne, sed nur kvin. Ni uzis tiujn du liberajn tagojn por ekskursi, kaj pri tiuj kulturaj vojaĝoj ni ankaŭ baldaŭ parolos.

## La loko de la klasĉambro

En Esperanto-Plaĝo I kaj II, la lecionoj kutime okazis en unu aŭ du el la loĝejoj de la gelnantoj mem. Pro tio, ni limigis la nombron da gelnantoj al nur 6, ĉar la salonoj de la loĝejoj ne estas grandaj. Eblas instrui kaj lerni, sufiĉe komforte tamen, en la individuaj loĝejoj. Kutime estas kvar seĝoj ĉirkaŭ la manĝo-tablo, tri sidlokoj sur la sofo, kaj kvar aldonaj seĝoj sur la plaĝa teraso ekstere. Do, teorie estas 11 sidlokoj, sed ses, laŭ mi, sufiĉas, ĉar se estas pluva, venta tago, ne eblas kursi ekstere sur la teraso. Kaj ankaŭ estas de tempo al tempo gastoj kiuj vizitas la kurson por observi, kaj eventuale partopreni iomete. Do, ĉiam bonas havas aldonajn sidlokojn en la salono mem.

Ni volas venontece esplori ĉu eblas havi pli grandan, eksteran lokon, ĉar estus interese havi 12 kursanojn, sed tia klasĉambro devas esti tuj proksime de la loĝejo de la gelnantoj, por ke ili povu iri al siaj ĉambroj dum la paŭzoj. Ekzistas unu tia ejo en la loĝejaro: la trinkejo de la la loĝejaro. Tie troviĝas tabloj kaj seĝoj, kiuj idealas por tre longdaŭraj lecionoj. Kaj tiu trinkejo ne uzatas ĝis la komenco de la turista sezono en junio, do ĝi liberas dum aprilo kaj majo. Tamen, la prezo eble estas tro alta por niaspeca kursaro. Memoru: Esperanto-Plaĝo ne estas semajnfino; ĝi daŭras du monatojn! Prezoj por lui salonon ofte baziĝas sur iu matena aŭ vespera uzo, unufoje. Longdaŭraj luadoj ne oftas.

## La kurso: enhavo kaj metodoj

La unua monato: profunda traĵo de la gramatiko. La metodoj kaj la enhavoj ŝanĝiĝis laŭlonge de la kurso. En la unua monato, la celo estis LERNI LA LINGVON, parolante ĝin flue, kaj skribante ĝin sencere. Do, gramatiko, prononcado, sufiksoj kaj prefiksoj, akuzativo en ĉiaj formoj, subfrazoj, la ig- kaj iĝ-sistemo kun centoj da uzoj, la partecipoj, kiujn la ĝelernantoj devis povi parole anstataŭigi per adjektivaj, adverbaj aŭ substantivaj subfrazoj. En la dua monato, ni ne plu celstrebe "lernis" la lingvon, ni UZIS LA LINGVON por lerni pri io alia: pri literaturo, ĉefe.

La unua monato: la BEK-Ekzercaro ĉe la kerno. La unuaj 30 tagoj baziĝis sur la granda ekzercaro de Esperanto, la BEK-Kurso (sed kun speciala eldono kreita por Esperanto-Plaĝo, kiu tamen similas la BEK-Kurson videblan ĉe [www.bekkurso.info](http://www.bekkurso.info)). Mi elektis BEK, ĉar nur tiu ekzercaro estas sufiĉe laŭstupa, sufiĉe longa, sufiĉe kompleta. Ĝi enhavas milojn da zorge elektitaj ekzercoj. La unua monato enhavas 200 horojn da lecionoj, do la materialo devas havi 200 horojn da leciono-enhavo. La BEK-materialo plenumis tiun bezonon. Esperanto-Plaĝo ne estas semajnfina kurso, en kiu la instruisto devas plani nur kelkajn horojn da ekzercoj. Esperanto-Plaĝo estas longega kursaro, kiu postulas tre longan, tre enhavo-plenan materialon.

Multe pli ol BEK. Sed BEK estas nur la ĝenerala strukturo, kaj inter ĉiu BEK-Leciono, ni kutime uzis aliajn materialojn, aliajn metodojn. Por eviti miskomprenon, sciu ke la kurso disvolviĝas sur kvar kapabloj: parolado, aŭskultado, legado kaj skribado. Kvankam ni uzis Esperanton la tutan tempon, ĉar ni estis en internacia grupo, la kurso tute ne estas unu el la tiel nomataj Rekmotodaj Kursoj. Do, inter la ekzercoj de BEK ni ankaŭ havis: diktaĵojn, parolado-ekzercojn (minimume 20, 50 frazoj), skribo-ekzercojn (minimume 20-50 frazoj), eseojn, tutkorpan respondado-metodon (Asher), la serio-metodo (Gouin), ekzamenetojn, liberajn paroladojn, prononcado-ekzercojn, aŭskultado-ekzercojn, kaj tiel plu. Ne estas unu metodo por la kurso; estas abundaj metodoj. Kaj finfine la kurso adaptiĝas al la bezonoj kaj psikologioj de ĉiu lernanto, kaj ne inverse.



Materialo uzata en BEK 1, 2, 3 kaj 4 en aprilo.

La dua monato: reala uzo de la lingvo. Do, en la unua monato, ni koncentriĝis pri la lernado de la lingvo, sed en la dua monato, ni ne plu studis la lingvon, sed UZIS Esperanton por preparoli diversajn temojn. La gelernantoj ĉestis ĉiutage nur kvar horojn da lecionoj dum tiu dua monato, sed ili havis multe da legaĵoj, kaj multe da hejmtaskoj kiujn ili devis fari posttagmeze kaj vespere. Inter la legaĵoj estis la kompleta libro "Ili Kaptis Elzan", de Claude Piron. "Ĉu li bremsis sufiĉe? ankaŭ de Piron. "La fabeloj, libro 1" de Hans Christian Andersen, kune kun "Denaska kongresano kaj aliaj noveloj" de Sten Johansson. Aliflanke estis ankaŭ kvar libroj pri Esperanto kiel lingvo: "Lingvaj Respondoj" de Zamenhof, "Fremdvortoj en Esperanto" de Neergaard, "Ne tiel, sed tiel ĉi" de Faulhaber, kaj "La bona lingvo" de Piron. Tiuj prilingvaj libroj helpis al la gelernantoj pli bone kompreni eksterlingvajn faktorojn kaj filozofiojn rilate la lingvon mem. Ekzemple: Kio kaj kia estas bona Esperanto? Entute, estis multege da legaĵoj, kelkaj kiujn ni finparolis, kaj kelkaj kiujn ni nur partostudis.

Abundaj hejmtaskoj, legado, preparado. La hejmtaskoj preparis la lernantojn plene partopreni en la leciono de la sekva tago. Kutime, ili skribis ion pri temo kiun ili mem elektis. Mi kolektis la skribaĵojn, legis ilin hejme, kaj skribis miajn korektaĵojn kaj komentojn antaŭ ol redoni ilin en la sekva tago. Lernantoj antaŭ devis ĉiutage prepari kvin-minutan paroladon, kiun ili prezentis al siaj kunlernantoj. Kaj alia grava hejmtasko estis legi el la 8 supre menciitaj legaĵoj, ĉar granda parto de la kvar horoj dediĉis sin al la riparolado de tiuj tekstoj. La gelernantoj estis plenplene okupitaj ĉiutage kun amaso da enlecionaj aktivajtoj.

## **Ekskursoj – por babili Esperanto kun lokaj Esperantistoj**

En la unua monato: la Urbo Valencio. La gelernantoj lernis kaj uzis Esperanton ne nur en la klasĉambro, sed ili ankaŭ ege ofte uzis Esperanton ekstere. Unue, ni ofte finis nian lastan lecionan horon en unu el la multaj trinkejoj proksime de ni. Due, en la unua monato, ni ĉiuŝaude per trajno iris al Valencio por renkontiĝi kun Esperantistoj dum la tie fama ĉiusemajna Kafo-Kunveno. Kaj esperantaj ĉiĉeronoj, kiel Luis, Elias kaj Rosa, gvidis ilin al multaj interesaj lokoj de Valencio: muzeoj, kulturaj centroj, la tri valenciaj kulturaj, heredaĵoj de Valencio. Parkoj, apudaj vilaĝoj, kunmanĝoj kaj tipaj valenciaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kiel "paella" aŭ "horchata". Kaj ĉiam ni provis la hispanan manieron tagmanĝi: antaŭmanĝaĵo, plado 1, plado 2, deserto, vino, pano, kafo. La kontraŭo de hamburgeroj, picoj kaj kebaboj! Tradicie hispane, lingve esperante.



Atendante la trajnon. Unu el niaj 12 ekskursoj sen krokodiloj.

En la dua monato: vizitoj al la tuta regiono. La ekskursoj plivastiĝis kaj ofte realiĝis ekster la urbo Valencio, kaj traitante la kamparon kaj la urbetojn kaj vilaĝojn de la regiono Valencio. Kaj ege ofte ni vizitis la urbetojn kun la helpo de lokaj, bonaj, ĉiĉeronaj Esperantistoj. En Gandía, Jaŭ. En Xeraco, Ivan. En Cheste, Rosa. En Alcira, Pau. En Mislata, Luis. En Favara, Santiago. En Ayelo de Malferit, Max – nia gasto en Esperanto-Plaĝo el Svislando. Tie ni vizitis la naskiĝo-lokon de Coca Cola, kaj ankaŭ la muzeon de la fama hispana kantisto Nino Bravo. En Succa, nia Esperanta ĉiĉerono ne alvenis, pro malsano, tamen ni povis tagmanĝi en la restoracio, kies kuiristo gajnis la ĉiujaran konkurso pri "paella". En Alboraya kaj Benimaclet, mi mem helpis gvidi gelernantojn al la fama "horchateria" Daniel, kaj tie pro la laboro de Max kaj lia filmado de la "Homa Ĉeno", la estro Daniel – la nepo de la unua Daniel -- gastigis nin Esperantistojn, pagante ĉiujn trinkaĵojn ("horchata") kaj manĝaĵojn ("fartons")!

## Financado

La tuta projekto, Esperanto-Plaĝo, funkciis sen ajna ekstera helpo aŭ subvencio. Estas la gelernantoj kiuj financas ĝin per siaj kurso-kotizoj. Gasto pagas neniom (Gasto ne partoprenas en la kursoj, sed povas akompani la gelernantojn dum ekskursoj, kafo-kunvenoj, ktp). Por la du-monata kurso, la kotizo estis 400 eŭroj. Aldone al tio, oni luprenis loĝejojn en la apudplaĝa loĝejaro nomata El Prado, ĉi jare, la prezo estis 490 eŭroj monate, do 980 eŭroj por 61-taga restado. Aparte, kompreneble, estis la manĝokostoj, sed kun supermerkato je malpli ol dek minutoj piede, kaj kuirejo en ĉiu apartamento, la elspezoj tiaj povis esti malaltaj. El la kurso-kotizoj, estis rezervo-pago de 100 eŭroj, kiu iris rekte al la kaso la Valencia Esperanto-Grupo. La kursgviganto, ĉi foje Dennis, ricevas 400 eŭrojn ĉiumonate por loĝado, kaj 150 eŭrojn ĉiumonate por manĝado. Se estas profito, ĉia profito iras rekte al al Valencia Esperanto-Grupo.

## Esperanto-Plaĝo, III, aprilo-majo 2024

Venontjare dum la tuta monato aprilo kaj la tuta monato majo okazos la Tria Esperanto-Plaĝo en Cullera.



Unu celo de la kursaro estas havi gelernantojn el Eŭropo kaj el Azio. La kurso taŭgas por komencantoj, sed se estas komencantoj el Azio, ili bezonas havi antaŭajn studojn pri lingvoj. Detaloj pri Esperanto-Plaĝo III, 2024, troveblas ĉe [Eventaservo.org](http://Eventaservo.org).

Unu el niaj ekskursoj. Ĉi tie ĉe la muzeo de Nino Bravo, kun niaj esperantaĵaj ĉiĉeronoj Max kaj Santiago.

# LA PERSONA ARKIVO DE VICENTE INGLADA EN LA BNE

En decembro 2022 la Nacia Biblioteko de Hispanio akceptis donace la personan arkivon de Vicente Inglada<sup>1</sup>.


Vicente Inglada Ors (Valencio 1879-Madrido 1949) estis profesoro pri astronomio, geodezio kaj meteorologio, geografia inĝeniero, sismologo, poligloto, staba oficiro, verkisto, studemulo pri tertremoj kaj aliaj fenomenoj de la naturo, akademiano de pluraj sciencaj institucioj, poeto kaj... Esperantisto 2. Do, elstara personeco, influa en ĉiuj kampoj en kiuj li laboris, inkluzive de la hispana Esperanto-movado. En ĉi tereno, li laboris kaj en organizaj taskoj de la movado kaj en la disvastigo kaj instruado de la lingvo. Li ankaŭ esperantigis pli ol dudek verkojn de hispana literaturo, ĉefe teatraĵojn, tiel kontribuante al la disvastigo de la hispana kulturo internacie<sup>3</sup>.

Li kunmetis laŭlonge de sia vivo grandan bibliotekon pri siaj du grandaj pasioj, geofiziko kaj Esperanto. La sorto de tiu biblioteko-arkivo post lia morto restas nekonata, sed fine de la pasinta jarcento, preskaŭ kvindek jarojn post lia morto, oni vendis parton de lia esperanta biblioteko kaj ĝin aĉetis kaj konservis scivolema bibliofilo, José Mañas Martínez, ĉar lia opinie temis ja pri kuriozaĵo.

S-ro Mañas konservis dum jaroj tiun kolekton apartenintan al Inglada, sed iam li decidis seniĝi je tiu posedaĵo. Unue, li provis aŭkcii ĝin. Tio okazis la 20n de oktobro 2022 kaj HEF, reprezentata de Manolo Parra kiel sekretario kaj mi, kiel biblioteka responduilo, ĉestis la aŭkcion, ĉar temas sendube pri io interesa por la Hispana movado, sed la postulata prezo estis tro alta: 2000 €. HEF faris kontraŭproponon de 800 € kaj jam dum la aŭkcia sesio, parolante kun la aŭkciestro, sugestis alternativon: kontakti la Nacian Bibliotekon. Io jam zumanta en la kapo de S-ro Mañas, laŭ la informoj de la aŭkcia responduilo. La kontraŭpropono de HEF ne estis akceptita, sed nur kelkajn semajnojn poste, la Nacia Biblioteko ricevis donacproponon de la posedanto



Portreto de Inglada ĉe 1905



Specimena letero en la persona arkivo

Kaj pro unu el tiuj koincidoj de la vivo, mi, kiu tiutempe laboris en la Nacia Biblioteko, sed en tute alia departemento ol tiu ricevinta la proponon, devis tamen iel nerekte okupiĝi pri la afero. Ĉar mi estas konanto de Esperanto kaj de ĝia bibliografia produktado sekve de mia laboro ĉe la biblioteko de HEF, oni petis mian helpon por pritaksi la proponon. Mi, do, verkis raporton pri la graveco de Vicente Inglada ne nur en la historio de la Esperanto-movado en Hispanio sed ankaŭ en la kultura vivo de la lando siatempe. Mi reliefigis la senduban intereson de lia persona arkivo, kiun oni pensis jam senrimede perdita, kaj kiu meritas iĝi parto de la datenbanko de Personaj kaj Korporaciaj Arkivoj (*Archivos Personales y de Entidades*)<sup>4</sup> de la Nacia Biblioteko por meti ĝin je la dispono de esploristoj, kaj emfazis la fakton, ke temas pri unika ŝanco rekuperi valoran kulturen heredaĵon.


La Nacia Biblioteko akceptis la donacon, kondiĉe nur ke ĝi povus elsarki tiujn titolojn jam troviĝantajn en la katalogo aŭ la materialojn seninteresajn por la kolekto de la biblioteko. Kaj S-ro Mañas akceptis la kondiĉon. Do, mi plej kontente povas nun informi vin pri la disponebleco de la heredaĵo de Inglada en grava institucio de la lando, kiu prizorgos ĝin plej taŭge kaj per multe pli bonaj rimedoj ol HEF povintus fari kadre de sia modesta biblioteko.

Tio plej valora inter la tuta havaĵo estas la korespondaĵo de Inglada kun Julio Mangada, Francisco Azorín, Andrés Piñó kaj Manuel Maynar. Ĉi dokumentaro helpas kompreni la dinamikon inter la diversaj sektoroj de la esperantismo dum la fruaj jaroj de la movado en Hispanio. Ĉiuj elstaris en aliaj sferoj kaj ludis tre aktivan rolon en la organizado de Esperanto-asocioj kaj grupoj. La rilato inter ili, influita de la malsamaj vidpunktoj, kiujn ili havis pri tio, kia estu tiu organizado, okazigis tre intensan debaton spegulitan en la gazetoj de la epoko, sed la rekta korespondaĵo inter la aktoroj provizos datumojn kaj nuancojn de la historio kiuj sendube restas malkovrotaj.

Iom post iom la biblioteko katalogos la heredaĵon de Inglada. Kaj mi kuraĝigas scivolemulojn kaj esploristojn pri la historio de la Esperanto-movado interesiĝi pri ĉi akiritajĵo de la Nacia Biblioteko.

Specimenoj de ia meritaj biografioj

Ana Manero



1 <https://dbe.rah.es/biografias/25569/vicente-inglada-ors>

2 <http://www.delbarrio.eu/ingladauni.htm>

3 De Inglada aŭ pri Inglada en Bitoteko: <http://bitoteko.esperanto.es/xmlui/discover?>

rpp=10&etal=0&query=%22Vicente+Inglada%22&scope=/&group\_by=none&page=1

4 <https://www.bne.es/es/catalogos/archivos-personales-entidades>

# FERVOJA ANGULO


## INTERNACIA FERVOJA LINIO INTER MADRIDO KAJ LISBONO

La unuan rektan trajnon inter Lisbono kaj Madrido oni inaŭguris meze de decembro de la jaro 1866. En tiu unua oficiala fervoja servo vojaĝis la hispana reĝino mem, Elizabeto la 2-a okaze de vizito en Lisbonon. Ĉi tiu internacia linio estis pli simpla ol tiu kiu komunikis Hispanio kun Francio, pro la fakto, ke Portugalio uzis saman trak-distancon ol Hispanio. Kompreneble, vole ne-vole Portugalio nepre uzis tiun saman mezuron ol tiu ekzistanta en Hispanio, ĉar la sola internacia fervoja eliro de Portugalio devas trapasi Hispanion.

Tiu unua linio estis terure malrapida, ĉefe pro la fakto ke la trajno haltis en ĉiuj stacidomoj konstruitaj inter Madrido kaj Lisbono, tio estas preskaŭ trideko da ili, ekzemple la halto en la urbo Badahozo daŭris unu horon. Do la vojaĝo daŭris 32 horojn, kvankam la tiutempaj reklamoj sciigis pri la fakto, ke kiel eble plej baldaŭ oni povus malpliigi tiun daŭron, do vojaĝi de unu ĉefurbo en la alian povus bezoni nur 26 horojn!

Alia afero kiu pliiĝis la daŭron de la vojaĝo estis la decido konstrui la linion pere de ne tro rekta linio, tio ŝuldiĝis al persona decido de hispana politikisto kiu deziris ke la nova internacia fervoja linio trapasu la vilaĝon kie loĝis lia familio.

Post 20 jaroj oni konstruis novan linion, ĉi-foje pere de la urbo Kacereso, tio signifis mapliigi la daŭron de la vojaĝo. Denove, la inaŭguro de la linio ricevis la viziton de reĝo, ĉi-foje de Alfonso la 12-a, kiu profitis la viziton por doni al Kacereso la honoran titolon de "urbo



Reĝa trajno de Alfonso la 12-a trapasanta la Kaceresan provincon (1881)

Tamen, la internacia fervoja linio inter Madrido kaj Lisbono neniam havis sukcesan ekspluatadon. Dum multaj jaroj tiu linio pli utilis por transporti varojn kaj mineralojn ol vojaĝantojn mem. Malgraŭ tio la linio supervivis, kvankam fine de la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento la hispana administracio decidis kontroli la privatan linion kiu mas-trumis la linion.

Kompreneble dum la civila milito la fervoja komunikado inter ambaŭ urboj haltiĝis. En la jaro 1943 la ĵus naskita ŝtata fervoja kompanio RENFE decidis ekigi novan fervojan servon inter Madrido kaj Lisbono kun tri trajnoj en la tago. La unua bezonis 12 horojn por plenumi la vojaĝon, temis pri trajno eĉ kun luksaj kondiĉoj, ĝi ricevis la nomon "*Lusitania Ekspreso*". Alia trajno, pli populara, reale temis pri poŝta trajno, bezonis 14 horojn por plenumi la vojaĝon. Fine, alia trajno estis dediĉita nur al transporto de varoj kaj ĝi bezonis 24 horojn por la vojaĝo inter Madrido kaj Lisbono.



Afiŝo sciiganta pri la nova rekta linio inter Madrido kaj Lisbono (komence de la 20a jardeko)

En la jaro 1986 la trajno "*Lusitania Ekspreso*" ŝanĝis sian nomon per "*Stelo Lusitania*" kaj en 1995 per tiu de "*Hotel-Trajno Lusitania*". La vojaĝo okazis dumnokte, tio estas, vojaĝantoj elirantaj el Madrido povus ripozi en la trajno kaj vekigi en Lisbono, kvankam verdire ĝi neniam estis luksa trajno kaj la komfortaj kondiĉoj ne estis tre kontentigaj.



Trajno Madrido -Lisbono jaro 1967

En la jaro 2012 oni ekuzis alian fervojan linion, trapasanta ĉi-foje la urbon Salamankon, tio estas jam ne pere de la urbo Kacereso. Denove la vojaĝo okazis dumnokte. Ĉi tiu fervoja linio malaperis en la monato majo 2020, pro la KOVIM-19 alarmo, sendube restriktaj por vojaĝoj en tiu jaroj malebligis la ekziston de linio kiu jam en tiu momento prezentis deficitan buĝeton.

Nuntempe la rekta fervoja komunikado inter Madrido kaj Lisbono ne ekzistas. Laŭdire, ekzistas projekto por starigi rapidtrajan linion inter ambaŭ urboj pere de la urboj Badahozo kaj Kacereso, tamen la portugala registaro decidis halti la projekton, ĉar ili preferas konstrui linion pere de la urbo Salamanko. Do, la projekto nuntempe ekzistas nur sur paperoj kaj mapoj, laŭdire nova internacia linio inter ambaŭ ĉefurboj ne povos okazis antaŭ la jaro 2030.



Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj

# LA STRANGA ANGULO Ĉapitro 9a

## La rolo de tia homo nomita sinacidigemulo

De longe vokas mian atenton la granda diverseco de homoj, kiuj piediras sur la surfaco de la tero. Mi tiom algluita estas al tiu diverseco, ke antaŭ pluraj jaroj mi komencis aranĝi sistemon, kies kategorioj estas tipoj de homoj, laŭ iliaj manieroj paroli, paŝi, pensi, senti, respondi, kulpigi ktp. Mi studis psikologion. Sed tiam mi ne trovis allogan tiparon, kiu utilas por la kompreno de la kondutoj. Do mi produktis mian propran sistemon. Jen parto el ĝi.

Antaŭ ol komenci per iu el tiuj specoj, lasu min enkonduki ĝin per peceto de mia nuntempa vivo.

Mi havas sepjaraĝan infaninon, kiu iras al baza lernejo, kie ekzistas asocio de gepatroj, kies prezidanto estas mi. Pro tia okupiĝo, mi estas en sinsekva rilato kun gepatroj kaj instruistoj. La lernejo situas en kvartalo sufiĉe humila, kies loĝantoj havas kutime malfaltan nivelon pri formala edukado, pluraj el ili serĉas laboron kaj suferas ekonomiajn problemojn. La pordo de la lernejo instruas min pli utile ol pluraj studobjektoj dum mia studenta sperto. Tie gepatroj alportas gefilojn aŭ iras por revenigi ilin al hejmo. Tiuj minutoj estas ora oportuno lerni. Pluraj specoj renkontiĝas. Mi komencos klarigi pri unu el ili, tiu kiu pli forte vokis mian atenton la unuajn tagojn. Temas pri la sinacidigemulo: ulo kiu emas igi sin acida. Ĉar la vorto eble tro longas, mi uzos la vorteton SAO. SAO estas homo, kiu vekigaĉas ĉiumatenc per esprimo simila al:

- Ho! Ve! Refoje tage! Ĉu la sunaĉo ne havas alian celon en sia feka vivo ol ĝeni min? Danke al multaj jaroj de spertoj, li aŭ ŝi duonsukcese ne batas ĉirkaŭantajn meblojn aŭ hejmbestojn por la celo ĵeti sian enan malkontenton.

Por SAO, homoj estas vivaĵoj, kiuj havis bonŝancon en la vivo kaj estas sinsekve bone traktitaj de ĝi. Male, la sinacidigemulo sange ŝvite penege suferas ĉian atingon.

Tia homo estas sensolve nekontentigebla. Se okazas A, venos plendo. Se A ne okazas, venos plendo. Se iun tagon SAO iras surstraten kaj trovas novan arbon meze de la trotuaro, oni aŭskultos:

- Kio? Kia la fek'! Ĉu la senutila urbestro ne havas ion por fari pli bone ol forĵeti la monon de la impostoj enmentante ĉi tien tian specon de plantaĉo?

Se iun tagon tia homo iras surstraten kaj nenio estas sur la trotuaro, oni aŭskultos:

- Kia la fek'! Kion faras la senutila urbestro per la mono de la impostoj, ke oni ne havas la rajton trovi eĉ unu arbon ĉi tie?

De antaŭ kelkaj jaroj, infanoj ne alportas librojn al hejmo. Anstataŭ tio, gepatroj havas eblon eniri en retpaĝon, kie oni trovas la saman enhavon, kiu estas en la libroj. Tiu decido estis vere bezonata pro multaj kialoj. Tamen iam kelkaj SAO plendis ĉe la pordo de la lernejo per:

- La tutan vivon, ĉiam ĉiam, la infanoj rompis sian dorson alportante plenan dorsosakon. Kiu stultulo decidis, ke nun jam ne estas tempo fari tion? Ĉu tia homaĉo vekigis per la nazo? Nun mi devas eniri en retpaĝon? Kial mi devas fari tion? La tutan vivon oni prenas librojn mane!

Kompreneble mi mildigas la realan esprimojn, kiujn mi aŭskultis dum tagoj. Mi ne deziras tro ĝeni la leganton. Gravus scii, ke post iom da tempo, la direktorino de la lernejo permesis, ke infanoj komencu alporti kelkajn librojn. Tiam, la plendo ĉe la pordo, far la samaj homoj, estis:

- Sed kio okazas nun? Ĉu tiu aĉulo ne havas alian ŝatokupon ol kapturnigi nin? Kion mi faru nun kun ĉi tia dorsosako? Ĉu tia homo pensas, ke mi loĝas ĉe la pordo de la lernejo? Kiel mi devas alporti tian plenan dorsosakon ĝis la domo? Laboru! Laboru! Ke vi havas komfortan salajron por nenion fari!

Mi observis intense eĉ la korpan sintenon kaj la mienon de tia homo. La tuta fizika esprimo montris klare la antaŭplendon. Ĝi estas homo, kiu pretas ĉiumomente kraĉi plendaĵojn al negravaskiu.

Kelkfoje mi klopodis interparoli, iom babili. Sed mi neniam havis sukceson. Ekzemple, iun tagon mi diris:

- Saluton, kara! Jes, estas iom da problemoj pri tio! Ĉu vi havas ian proponon! Mi eble povus helpi realigi ĝin.

La reago de la du homoj al kiuj mi direktis la voĉon estis de granda surprizo. Unu el ili abrupte silentis. Kaj la alia diris mallaŭte kelkaj frazojn, kies logikon mi ne kaptis. Aliajn tagojn mi provis per malsamaj manieroj eniri en la babiladon. Sed neniam sukcesis.

Mi rakontas ĉi tion malĝoje.

Estis instruisto en la lernejo kun kiu mi havis bonan kanalon. Li estis ege amata de infanoj, gepatroj kaj kolegoj. Ekde iu tago li ne iris al lernejo. Infanoj ricevis la novaĵon, ke li estis malsana.

Post unu semajno, la vacapa grupo de la gepatroj bruliĝis. Vacapo kaj bruliĝado estas du eroj, kiuj kutime iras kune. Sed tiam, la bruo estis surdiga. Gepatroj jetis ĉiajn plendojn kontraŭ tiu instruisto. Ĵurnaloj el la urbo informis, ke li perfortis infaninon. Pluraj gepatroj decidis iri al la lernejo kaj bruligi ĝin. Aliaj diris, ke ili prenos la direktorino

per la hararo kaj mortigos ŝin. Aliaj informis, ke jam piediras al la lernejo por preni sian filon kaj savi lin de la danĝero. Post legi la unuajn cent vacapaĵoj kaj lasi sen legado la ceterajn, mi informis, ke kiel prezidanto de la asocio de gepatroj mi tuj serĉos precizan informon, ke bonvole ne maltranviligu nek tro rapide decidu. Kelkaj reagis dirante, ke se mi akceptas ke mia infanino estu perfortita estas mia problemo, ke ili ne restos sen fari ion. La reagoj estis teruraj.

Kiel dirite, mi serĉis informon. Mi legis ĉiujn ĵurnalojn kaj kunvenis kun la registraro de la lernejo. Meze de tiu agado, ni ricevis la novaĵon, ke la instruisto sinmortigis.

Refoje ĵurnaloj faris sian laboron varmigante la etoson. Gepatroj siavice reagis. Kelkaj pentis. Sed kelkaj plendis, ke tiu instruisto sinmortigis ĉar ili deziris mortigi lin.

Mi petis novan kunvenon. Sed mia peto ne estis bezonata. La direktorino jam tion aranĝis; kaj partoprenis ankaŭ la respondeculo de la regiona edukada sistemo. Ĉio okazis rapide.

La konkludo estis klara je pluraj vidpunktoj. La patrino de iu infanino denoncis la instruiston. Laŭ la faktoj denoncitaj, la infanino diris, ke ŝi sentis malkomforton pro kelkaj kondutoj de la instruisto kaj ke eĉ unu fojon la instruisto tuŝetis ŝian dorson. La esplorado ne trovis ion, kiu estas indico de malbona konduto.

Eble la patrino bone decidis, ĉar ŝia rolo estas protekti sian gefilon eĉ de ne klaraj danĝeroj. Ĵurnaloj rimarkis la okazon plialtigi la nombron de legantoj. Pluraj gepatroj kondutis kiel sencerbaj bestoj. Rezulte, sentema homo sinmortigis.

Mi redaktis dokumenton, informante pri la faktoj. Estis kvar paĝoj plurfoje reviziitaj de mi men antaŭ ol decidi sendi ĝin al la vacapa grupo, al la reprezentantoj de la klasĉambroj kaj al la registraro de la lernejo. La celo estis klare priskribi tion, kio okazis, kaj klopodi ne nur malvarmigi la etoson, sed ankaŭ atingi iom da pripensado de la gepatroj. La rezulto estis duonsukcesa. Vacapo mortis dum tagoj. Kiam ĝi reviviĝis, la temo jam ne estis menciita. Sed neniu pardonpetis. Neniu voĉe aŭ skribe diris ion, kiu montras penton.

Du monatojn poste, pluraj kolegoj ploras kaj kelkaj gepatroj alproksimiĝas al mi plendante pri la konduto de la aliaj. Kaj tiuj SAO, kiuj komencis la bruligadon, sekvante sencerbe la ĵurnalojn, kiujn ili mem taksas nefidindaj, sentas sin senkulpaj. Kvazaŭ nenio okazis, refoje ili atendas ĉe la pordo de la lernejo, plendante pri la dorsosakoj, la direktorino, la urbestro, la arboj sur la trotuaro kaj la vivo mem.

Viko

# De A al Z

Kara Z:

Mi skribas tiun leteron por rakonti al vi kion mi sentas pri vi de antaŭ longe. Ĝuste ekde kiam vi disiĝis de Ŭ ĉar V intermetiĝis inter vi du. Tiam vi ŝajnis al mi tiel kuraĝa kaj malavara kun ili, ke mi tute enamiĝis de vi kaj ekde tiam mi suferas kvazaŭ morton. Mi ne povas rakonti tiun ĉi al neniu ĉar al B, la sola kun kiu mi povas paroli mallaŭte, mi ne emas. Ĝi estas tiel bastarda kaj brutata, ke mi ne kuraĝas kundividi miajn sentojn kun ĝi. Mi timas ke ĝi diskonigu la aferon tre laŭte kaj vi jam scias kiel klaĉemaj ni estas, precipe tiu ne tiel malapuda K, kiu eksciigus ĉiujn tuj kaj jam estus neebla gardi la sekreton.

Do, mi decidis skribi por vi tiun leteron kaj lasi ĝin proksime, kvazaŭ neglekte, kiam ni estos proksimaj ĉar iu skribu, ekzemple, “adzo”-n. Tial ke vi kaj mi estus apude unu al alia, eble vi povus preni kaj legi la leteron kaŝe. Komprenoble, antaŭe mi intencus altirivan atenton por ke vi sciu ke mi volas doni leteron, ekzemple mi fariĝus majusklo senzorge, por mi rimarkigi min al vi, ĉar kial oni povus komenci frazon post punkto per elizita “Adz”?

Mi jam provis ĉion kio venis al mia kapo por alproksimiĝi al vi, sed mi tute malsukcesis. Vi ne devas pensi, ke mia amo estas nur platona, mi suferas morton pro ne esti apud vi, por senti vin tre proksime al mi, sed ĝis nun ĉio kion mi provis, fiaskis kaj faris neebla nian apudiĝon.

Iam mi glitiĝis malantaŭ kelkaj literoj ĝis H, kie mi pensadis balanciĝi sur ĝia meza streko por antaŭenigi min ĝis Ŝ, uzi ĝian ĉapeleton kiel elastolito kaj tiel katapultigi min ĝis U kaj tie, glitigante per sufiĉa rapideco sur ĝia kurbo, fali sur via malsupra streko, loko kiu ŝajnas al mi la plej bona del mondo por pasigi mian tutan vivon.

Vi kaj mi tiel aspektus tre bela anagramo, ĉu ne?

Mi jam havis ĉion planita, vi sciu, sed kiam mi paŝis malantaŭe F kaj G (tiel flama la unua kiel glacia la alia), ili rimarkis min kaj ekkriis: “Vidu, vidu, sed kien iras tiu frenezulino?” “Ĝi ĉiam volas atentigi ĉiujn!” “Ĝi pensas stultege, ke estas la Unua pro propraj meritoj!” Kiel ĉiam, la ĉiosciaj konsonantoj donantaj lecionojn al la aliaj! (Krom vi, mia amata, vi estas speciala).

Resume, mi devis memturni al mia loko preteratente. Tia maniere ili hontigis min, ke mi jam kuraĝas provi nenion. Se ni havos bonŝancon kaj mi sukcesas atingi al vi ĉi tiun leteron (venas en mia kapo, ekzemple, transporti ĝin per ventopuŝo aŭ en beko de kolombo dresita de mi, kion mi scias!), vi jam diros al mi se vi reciprokas tiun ĉi amon.

Miaflanke, amo mia, mi subtenos ĉiam viva nian lastan esperon: la cirkla ordo.

Ĉiam via,

AGUEDA

# ĈU LA PREZIDANTO PUTIN SIDIĜOS ANTAŬ LA INTERNACIA KRIMA KORTUMO?

La pasintan 17-an de marto, la Internacia Krima Kortumo (IKK) eldiris arestordonon kontraŭ La prezidento de Rusio Vladimir Putin kaj kontraŭ funkciulinino Maria Aleksejevna Lvova-Belova, rilate la hipotecon planon perforte deporti milojn da ukrainiaj infanoj en Rusion, post la invado de Ukrainio en februaro de 2022. Komprenibile, Rusio neis tiujn akuzojn kaj eĉ ĝia ministro pri eksterlandaj rilatoj diris ke “tiu tribunalo ne gravas” (do, li fajfis pri tio).

La IKK estas internacia tribunalo por juĝi personojn akuzitajn pro gravaj krimoj ĉefe genocido, milito kaj krimoj kontraŭ la homaro. Ĝiajn antaŭaĵojn oni povas trovi jam post la naziaj krimoj okazintaj dum la dua mondmilito kiam oni starigis la specialajn tribunalojn de Nurembergo kaj Tokio por juĝi la militajn krimulojn. Sed poste, ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN) ĝia Sekureca Konsilio rekomendis al ekspertuloj la eblecon starigi konstantan krimkortumon, temon kiu ne antaŭeniris ĝis la gravaj okazintaĵoj de la jugoslaviaj genocidoj (1991-1995) kaj Ruandaj (1994). Tiam, en Romo (Italio) okazis Diplomatia Konferenco de UN por starigi internacian krimkortumon, kiu finiĝis la 17-an de julio 1998 kiam oni kreis la “Internacia Krima Kortumo”. La teksto estis ratifita en 2002.

Tiu ĉi kortumo juĝas ne ŝtatojn sed homojn, kaj estas konstanta tribunalo. IKK ne estas tribunalo de UN (ĉar UN havas sian propran internacian tribunalon nur por membroŝtatoj), sed IKK iamaniere restas ligita al UN, ĉar per la 7-a ĉapitro de la Ĉarto de UN la Sekureca Konsilio rajtas alporti aferojn al Prokuroro de IKK, kiu akuzos la krimulojn.

Komprenibile, IKK rajtas agadi en ĉiu membroŝtato aliĝinta al tiu tribunalo, sed en ne aliĝintaj landoj, oni bezonas la akuzon de la landa registaro aŭ de la Sekureca Konsilio de UN.

Sed fakte ĉu Putin povos esti juĝota per tiu Kortumo? Unue, Rusio ne estas membro aliĝinta al tiu ĉi kortumo, Ukrainio ankaŭ ne, sed antaŭtempe akceptis ĝian jurisdikcion kaj estante militkrimo aŭ krimo kontraŭ la homaro, la Prezidento de Rusio povus esti akuzita. Problemo estas ke tiu tribunalo ne juĝas foreste, do certe Putin devus esti alportata per Rusio, kaj tio estas nesupozebla dum li regos la landon. Aliflanke, la proceduro en la kortumo ankaŭ povas komenci per la akuzo de la Sekureca Konsilio de UN, sed tio ankaŭ ne eblas, estante Rusio konstanta membro de tiu organo de UN kaj pro tio kun vetorajto..

Do, se al tio ni aldonas ke inter aliaj gravaj ŝtatoj kiel Usono, Ĉinio, Hindujo, Israelo, Kubo, Irakio ktp ne estas membroj aliĝintaj al la IKK, bedaŭrinde ni konstatas la gravajn malfacilaĵojn por juĝi internaciajn krimulojn de la grandaj potencoj.

Ĉefe Usono estas ankoraŭ pli polemika, ĉar en 2002, oni aprobis leĝon pri “protektado de la usona personaro”, malpermesante al registaroj kaj federalaj organizoj iri antaŭ tiu Kortumo. Pli grave estas ke tiu leĝo permesas al Prezidento de Usono utiligi “ĉiujn necesajn rimedojn por liberigi iu ajn usonanon kaptitan au enprizonitan por iri antaŭ la Internacia krima Tribunalo”, tio kio estas kontraŭa al Internacia Juro, kie interna leĝo ne povas kontraŭdiri alian internacian normon.

Do, bedaŭrinde ni konstatas ke la konstantaj membroj de la Sekureca konsilio de Unuiĝintaj Nacioj konsideras sin “netuŝeblaj” kaj tion pruvas la multnombraj rezolucioj por studi krimojn de Israelo en Palestino, kun la nepuniteco preskaŭ kompleta de la israelaj armeoj danke al helpo de Usono, la apogo de Ĉinio kaj Rusio al la registaro de Venezuelo, kaj multaj aliaj okazintaĵoj.

M. Rafaela Urueña

---

## KAMPANJO POR KONSERVO DE LA KURSOJ DE DUOLINGO

La granda kompanio por reta lernado de lingvoj, Duolingo, anoncis la malaperigon de la kursoj de Esperanto en aliaj lingvoj krom la angla. Tio tuŝas la hispanan kurson, kaj TEJO (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo) lanĉis kampanjon por tion eviti.


Hispana Esperanto-Federacio kaj Fundación Esperanto subskribis la alvokon de TEJO kaj petis la kompanion ke ili konservu la kursojn.

Oni ankaŭ lanĉis retan kampanjon, por ke individuoj povus subskribi tiun peton. Vi trovos ĝin ĉe:

<https://www.change.org/p/for-the-duolingo-esperanto-courses-por-la-esperanto-kursoj>  
Helpu ankaŭ vi!



## ESPERANTO EN LA FAKULTATO PRI FILOLOGIO



Juan Pablo Mora [hŭan pablo mora] estas profesoro pri aplikata lingvistiko en la Fakultato pri Psikologio en la Universitato de Seviljo. Dum la lastaj du jardekoj li okupiĝas ĉefe pri du aferoj. Unu el ili estas klopodi, ke la studentaro lernu bone kaj socie utile. Tio signifas helpi studentojn havi sperton pri realaj defioj en realaj kunteksto. Ekzemple, kelkaj el liaj studentoj okupiĝas pri, kiel helpi komuniki infanojn, kiuj spertas problemojn pri la prononcado pro biologiaj kialoj.

La dua ĉefa okupiĝo de Juan Pablo estas la lingva justeco. Li sinsekve klopodas videbligi la rajtojn de lingvoj, dialektoj kaj parolmanieroj. Pro tio li defendas la signolingvojn aŭ la facilan lingvon. En Hispanujo ankaŭ okazas, ke multaj homoj mokas pri la prononco de andaluzanoj, ekzemple. Aŭ ene de Andaluzio, multaj loĝantoj mokas pri la prononco de la literoj C, Z aŭ

S, kiuj sufiĉe malsimilas inter lokoj.

Antaŭ kelkaj jaroj, Juan Pablo renkontis la koncepton de lingva subpremado danke al iu universitata agado, kiun mi realigis pri tiu koncepto. Ekde tiam, ambaŭ decidis kunlabori kaj por pli bone kompreni tian maljustecon kaj por stimuli la scikonon de la studentoj pri la lingvaj malekvilibroj. Nature, Juan Pablo ne nur akceptis la ekziston de Esperanto sed ankaŭ decidis disvastigi kaj defendi ĝin. Pro tio, ĉiujare li vokas vin por la celo prelegi antaŭ proksimume cent studentoj el du studobjektoj.

Ĉi tiun jaron la afero paŝis malsame. Unuflanke, unu el la studentinoj de Juan Pablo, nomita Ángeles Sánchez Ramos [anĥe-la sanĉes ramos], decidis lerni Esperanton la pasintan jaron kaj tion ŝi realigis. Do ŝi alligis al la celo prezenti la lingvon al klasĉambranoj. Aliflanke, mi suferis inflamon de la faringo. Do mia voĉo ne taŭgis por

la tasko klarigi pri io. Do mi petis helpon al mia filino 8-jaraĝa Gabriela. Ŝi akceptis kaj pretigis etan prelegon pri la propedeŭtika valoro de Esperanto.



La duan semajnon de marto de 2023, Gabriela, Ángela kaj mi prezentis la lingvon al grupo de studentoj en la fakultato. Ni alportis komikson, kiu estis planita de Ángela kaj mi, kaj kies desegnaĵoj estis realigitaj de Gabriela. La komikso estis dulingva kaj havis la celon prezenti gramatikajn vortojn (kunigitaj en vortareto je la fino de la dokumento). Ni printis plurajn ekzemplerojn kaj disdonis ilin en la klaso.

Fine ĉar mia voĉo ne taŭgis kaj la partopreno de Ángela estis rapida, Gabriela iĝis la ĉefa preleganto, kiu aldonis multe da informo (gramatikaj reguloj, la arto fari kunmetaĵojn, la libereco de la lingvo ktp), klarigis demandojn de la ĉeestantoj kaj konsilis pri, kiel eviti erarojn, kiujn ŝi rimarkis, ke ŝi faris dum la unuaj paŝoj de lernado. Dum la sperto, ni laborigis studentojn: lernante la lingvon danke al komikso, ili devis babilu en grupetoj sinprezente, demandante kaj responde.

Same kiel ĉiam, ni semas malgraŭ la fakto, ke neniam oni povas antaŭvidi, ĉu la semoj estos fruktedonaj krom la bona estanta sperto.

Danke al la sperto, ni notis kelkajn indajn ŝanĝetojn por la komikso, pensante pri la baldaŭa sperto en EABE'2023. Sed tio estas alia rakonto...

Viko.

